

Moto

La animo limigita nek per la tempo
nek per la spaco
forviŝas la diferencon inter la vivo kaj la morto
al la senfina daŭreco.
La senesperon kiel pigre rulantan nebulon
ŝanĝas je freŝe falita neĝo.

La rivero sunradiojn refraktas
por reveni ilin reen suben —
pliriĉigitajn je la homa sperto,
je la ekkono de la favoro de kreado, je espero,
sendas sian mesaĝon plu en la Universon.

La animo ne mortas

Věra Ludíková

Antaŭ kelke da jaroj mi ekkonis eminentan komunumon de homoj apartenantaj al tn. Ĉeĥa konferenco, kiu klopodas pri superigo de la ĉeĥa socio. La parolantoj antaŭpaŝas atentemajn aŭskultantojn kaj laŭ siaj konoj, siaj spertoj kaj kapablecoj taksas analogiojn kun la pasintaj eventoj, ĉefe serĉas la elirejon el la sorĉigita rondo de la senelireco kaj de la sento de la ĉeĥa malgrandeco. Koncernas pri klopodoj urĝe necesaj. Ŝajnas, ke ĉesas validi moralaj valoroj kaj la demando de la hodiaŭo sonas kiel ĉesigi ilian devaluton. Ni sentas nin ĉirkaŭvolvitaj per silka fadeno de superantaj materiismaj celoj kaj karcerigitaj en iliaj kokonoj; kvazaŭ ni estus glukovritaj per io malpostulata kaj nepura, ni estas senmovigitaj en mistifikajoj...

„Ĉu la vivo de homo estas pilgrimo, aŭ prefere esplorpado de konkeranto, malkovranto de Novaj horizontoj?“ demandas sinjoro kardinalo Tomáš Špidlík (*Tomaš Špidlík*). „Ni vivas en la epoko de egaj renversoj. Tial la miljaraj pruvigitaj padoj ŝajnas al ni tro mallarĝaj, nekomfortaj, malrapidaj... La hodiaŭa dekliniĝo el la vojo ne estas nura portempa promeno, tio estas trapaŝigado de nova direkto. Kaj milionoj da venontaj homoj iamfoje demandos nin: „Kien vi ĝisgvidis nin?“ Ĉu ni estas certaj, ke ni ne perdis la direkton kaj ke ni ne gvidas la homaron en dezerton, kie paŝo post paŝo mortos nia civilizo, kulturo kaj spiritaj valoroj?“

Ni jam estas sur la krucovojo, eble iome post ĝi. Malgraŭ la senĉese sonantaj avertaj voĉoj, ke la homaro paŝas en la sakstrateton pro la superflua ĉerpado de krudaĵoj, pro la populacia eksplodo ĉefe en la plej malriĉaj landoj, aŭ pro la detruado de pluvaj praarbaroj ktp., ni estas lulitaj per la imago, ke ĉe ni, en nia Eŭropo, nenio terura okazas kaj la vorto „milito“ sonas por ni kiel io tre malproksima kaj kvazaŭ forgesita...

Antaŭ nelonge ni estis vekitaj el la sonĝo kaj elirigitaj disde miskompreno. Eĉ en nia malnova, bona Eŭropo estas instigata tendenco por malami, kreskas perforto pro la malamo al aliuloj, eĉ tendenco mortigi ilin, kaj la vorton transprenas terorismo en sia tuta hororiga formo.

Ĝuste hodiaŭ ni estas atestantoj de fenomenoj, kiuj akompanas la renversan epokon – unuopaj eventoj rapide sekvas unu la alian kaj ŝancelas niajn ĝisnunajn certecojn. Ilia tempo finiĝas, niaj certecoj estas almenaŭ ŝanceligitaj, ŝajnas, ke plu ne validas internaciaj interkonsentoj, ke ne validas juro, ke la limoj ne estas nerompeblaj. Ekonomia tondilo tro multe dispartiĝas, ŝtatoj kaj nacioj submetiĝas al sia propra megalomanio kaj sinfiereco, per kio ili malkaŝas siajn embarasojn pro la problemoj en siaj propraj landoj. Atenton al si turnas longe nesolvataj kaj prokrastataj demandoj pri la kunvivo de multekulturaj kaj multenaciaj komunumoj kun

diversaj religiaj sistemoj. La nova komenco de la evoluo de la homaro estos nek komforta, nek rektlinia...

Ĝis antaŭ nelonge ni vivis konvinkitaj, ke la paco en Eŭropo estas persista, ke ni havas demokration, kiun oni povas pro multo riproĉi, sed – dank' al Dio por ĝi. Ni submetiĝis al certa formo de komforteco dank' al la sento, ke la ŝtato zorgos pri ni, ke ni havas solidan medicinan flegadon kaj certan pension, ni ne devas ĉiutage batali por transvivi.¹⁾

Tio ne estas natura en la naturo.²⁾ Ĉiuj kreaĵoj devas ĉiutage batali por sia transvivado, do eĉ ni devus senĉese superigi nian komfortemon kaj ĉiam pri io strebi. Laŭ sciencistoj, nia cerbo disvolviĝis kiel la ilo por solvi problemojn kaj transvivadon en la ekstera medio, dum la daŭra movado kaj ŝanĝiĝantaj kondiĉoj. La kapacito de nia cerbo nepre interrilatas kun la grandeco de la komunumo, en kiu ni vivas.

Unu el la hipotezoj diras, ke nia cerbo estas tiel granda pro tio, ke ni povu ekregi ĉiujn sociajn rilatojn; nia spacoamplekso estas pli kaj pli larĝa, sed samtempe ĝi mallarĝiĝas. En la momento, kiam ni cerbumas pri niaj propraj ideoj, estas preskaŭ neeble cerbumi pri ideoj de aliuloj kaj male. La baza intereso de la cerbo estas la transvivo, tio signifas, ke la cerbo klopodas minimumigi danĝeron kaj maksimumigi avantaĝojn.

La cerbo skanas la ĉirkaŭaĵon ĉiun kvinonon da sekundo por ekscii, ĉu io ne minacas nin, aŭ ĉu ni atendu iun avantaĝon. Kvinoble pli multe da receptoroj kapablas indiki minacon ol pozitivan vibradon, tial ni havas iun naturan dispozicion por kapti negativecon. Tial homoj legas plej favore mesaĝojn pri diversaj katastrofoj – hororoj allogas ilin. Tial estus inda, ke homoj senĉese aŭskultu belajn, esperigajn vortojn, kiuj alportas lumon kaj esperon kaj superigas la homon...³⁾

La homa ekonomo disvolviĝas tiel trarapide, ke la homa fantazio troviĝas malproksime post ĝi. Tiu rapideco tamen invokas leĝerecon; mankas sufiĉo de pacienco por trovado, demandado kaj malkovrado. La nuntempo estas tia, ke ĉiuj klopodas ĉefe sukcesi materio-koncerne kaj ne demandas, ĉu eblas tiun vivmanieron uzadi senfine kaj ĉu la valorskalo, kiu preferas la finance sukcesajn kaj potenciajn ulojn, ne estas malbone ĝustigita.

Bedaŭrinde, hodiaŭ ni samtempe estas atestantoj de la stagno de ĝenerala homa klereco. La partosciado, kiu produktas ĝeneralan superfluron de informoj, kovras la ĝustan komprenon de la mondo. Ne nur la manko de informoj, nome de tiuj esencaj kaj veraj, sed ankaŭ la nekapableco envicigi la informojn en konsekvencojn kaj formi sian propran seriozan vidpunkton, povas gvidi al la ekesto de ĝermoj de la fanatismo en tiu nutriva grundo kaj al ilia sekva multobligado. Ni estis atestantoj de tiu procedo en la pasinteco, sed ni povas atesti tion ankaŭ nuntempe.

Helpe de informteĥniko homoj kolektas konojn kaj uzas sciojn, kiujn ili ne proprigis al si per siaj propraj spertoj kaj per klopoda studado. Malgraŭ tio, ke ili estas sukcesaj en praktika vivo surbaze de tiuj scioj, ili ofte ne scias, ke ili estas nescipovaj kaj nekompetentaj okaze de multaj ĝeneralaj problemoj.

Gravaj aferoj estu decidataj de la larĝvidaj homoj.⁴⁾

La renesanco de la socio, la renesanco de la homeco ekestos nek per ŝanĝo de ministro, nek per renverso de la registaro, kiel multaj ribelantoj supozas, sed ĝi okazos nur post la ŝanĝo de

valoroj, kiujn homoj estimas kaj je kiuj kredas. Homoj devas unuavice estimi sin mem. Mallarĝiĝas la vicoj de tiuj eminentaj personecoj, kiujn ni treege estimis kaj kiuj estis por ni moralaj aŭtoritatoj al kiuj ni suprenrigardis kaj kiuj estis por ni modeloj...

Ni ne devus anticipi timi nekonataĵojn, ni prefere kredu, ke ni sukcesas problemojn solvi, ke ni sukcesas influi niajn starpunktojn, nian psiĥostaton, nin mem kaj nian ĉirkaŭaĵon. Anstataŭ la timo, ni estu certaj per si mem, por ke ni ne panikiĝu, ke ni preferu seriozajn aferojn, ke ni ne permesu eniron de malbono en nian proksimecon kaj ni ĉiam harmoniiĝu kun la ondoj de bono.

La koro kaj la sento mem diros, kio estas ĝusta, nur ili ne devas esti superbruitaj.

Ni zorgu prefere pri tio, ke ni ne erariiru de la destinita elektita vojo en la momentoj de diversaj, oftaj kaj ĉiutagaj decidadoj. Ni devus havi enkoditajn, profunde en nia subkonscio, nian vivplanon, nian vivtaskon, niajn valorojn – ne nur kiel unuopuloj, sed kiel la tuta nacio, la tuta homaro.

La bezonaj ŝanĝoj devas veni de la homoj, kiuj dum sia vivo sukcesis ion fari.⁴⁾ Nenio estas senŝanĝa, ĉio evoluas, tamen havas siajn severajn laŭlegajn regulojn, tial ni klopodu ekkompreni leĝregulojn naturajn kaj kun ili ligitajn leĝregulojn sociajn. Tio estas grava ne nur por la sento de la ekzisto de certa ordo, kiun ni ne povas neglekti, sed tio ankaŭ estas grava por la ekkono de la esenco de la ekzisto mem – tial oni ne eblas gradigi ion ajn senfine, eĉ se oni klopodadus pri tio plu kaj plu.

Ni observas, ke la tutmondiĝo

atingas siajn limojn kaj ĝian pluan prosperon homoj ne sukcesos konservi. Oni probable revenos en siajn proprajn areojn kaj regionojn kaj turnos sin al novaj teĥnologioj celitaj al la loka produktado. Tiu monda trendo ne estas haltebla, ĉar ni ĉiuj estas elementoj de la evolua movo kaj ni havas neniun alian eblecon, nur ekkoni tiun procedon kaj adaptiĝi.

La hodiaŭo estas antaŭĉie alvoko. Ni ne timu novajn taskojn, kaj ni kiel eble bone preparu nin por ilia solvado. Ni nur devas timi neglektemon kaj indiferentemon.

Eĉ fizike neglektenda, pro sia spirito la homo estas grandegulo, ĉar li/ŝi kapablas ekkoni kaj pritaksi – li/ŝi kapablas ekkoni la cirkonstancojn de la naturaj kaj sociaj leĝreguloj, por ke li/ŝi povu vivi kun ili en harmonio; li/ŝi eĉ kapablas antaŭvidi la venonton; tial li/ŝi devus transpreni sian parton de respondeco por tiu belega loko sur nia planedo, por la planedo entute. Nun estas la tempo de ega espero por tio, kio alte superas nin mem.

Speciale hodiaŭ – post la malkovro de t. n. antropika principo – [ekkono, ke ĉiuj konstantoj en la Universo havas precize tiujn proporciojn, kiuj ebligas la ekeston de la vivo] – ekhavis la esprimo de Immanuel Kant tre profundan signifon, ĉar ĝi donas sencon al nia ekzisto en la Universo: „Du aferoj plenigas mian penson ĉiam per nova kreskanta admiro kaj estimo, kiam mi pri tio cerbumas; stelplena ĉielo super mi kaj morala leĝo en mi... Ambaŭ mi direkte kunligas per la konscio de mia ekzisto.“

La evoluo de la homo kaj lia/ŝia animo kaj la animeco ne kontraŭas naturajn leĝojn. Ĝi komenciĝas en la punkto Alfo kaj antaŭenpaŝas ĝis la punkto Omego, ĝis la celo de nia vojo, ĝis Kristo.⁵⁾ Simile, la tuta homaro celas al la spiritnobleco – oni turnos sin al la kvalito de la

ekzisto anstataŭ kvantito, kaj zorgos pri sia pliperfektigado. Tiaj konsideroj de Theilhard de Chardin donacas al nia klopodado senton de plensenco... Jam en antikvaj tempoj la animo estis objekto de filozofia⁶⁾ studado. Ĝi estis parte konsiderata kiel io vivanta, kio ‚loĝas‘ en nia korpo kaj povas ĝin forlasi kaj eniri alian korpon (la transiro de la animo). Kelkaj grekaj kleruloj (Platono) pensis, ke la animo de la homo, ekipita per racio, estas nemateria eterna diodevena substanco kaj kreas la esencon de la homo (senmorteco), aliaj (Aristotelo) konsideris la animon kiel parton de la korpo. Pli poste, ene de kristanismo, ekzistis tiuj du konsideroj paralele.

La esencan malkovron donis al ni du usonaj scienculoj,⁷⁾ aŭtoroj de la kvanta teorio de la konscio. La animo ne mortas kun ni, nur la strukturo de niaj cerbaj ĉeloj perdas sian kvantan staton, sed ne la informojn enigitajn en ili, tiuj ne estas neniigitaj. Ili disiĝas en la Universo. La religio priskribas tion kiel la eliron de animo el la korpo. Post kiam ni mortas, tiuj informoj plu vivas ekster la korpo kaj fariĝos parto de alia formo. Tiu malkovro povus esti precipe grava por tiuj unuopuloj, kiuj dubas pri la senmorteco de la animo kiel konsideras ĝin kristanoj, aŭ kiuj rifuzas ĝin. La animo limigita nek per la tempo nek per la spaco forviŝas la diferencon inter la vivo kaj la morto, al la senfina daŭreco. Ĝi taksas, resumigas, ribelas, rifuzas la submetiĝon al la senespero, ne akceptas malvenkon kaj estas dankema, nekredeble dankema al eminentaj kuracistoj, ĝi estas dankema al gardaĝeloj, ĝi estas senfine dankema al Dio mem. Ĝi tamen estu devigata redoni tiun favoron sammaniere, kiel ĝi estas kapabla la bonon redoni...

La subjekta animo manifestiĝas per la racio, per la ekkompreniĝo al si mem kaj al la ekzisto, per libera memrealigado kaj per krea agado. Tiasence oni parolas pri la animo de la homo (kontraŭe al la korpo). La animeco de la kristana Dio demonstriĝas kiel aparta persono en la Dia substanco – la Spirito Sankta. La suma nocio de kreitaĵoj, en kiuj koncentriĝas spirita kreado de individuo, signiĝas kiel t.n. objektivigita spirito. Diference de tio objektiva spirito signifas superindividan, spirite historian mondon, kien homo kiel unuopulo enkreskas, kun kiu li/ŝi egaligas, pri kiu li/ŝi respondas; tiu ĉi mondo manifestiĝas precipe per la lingvo kaj per aŭtoritatoj. „La konscio ne estas produkto de la cerbo,“ anoncis usona psiĥiatrio⁸⁾ de la ĉeĥa origino, vizitinte Pragon, „sed ĝi estas la fundamento de la ekzisto.“ Kiel proksime estas al tio la opinioj de antikvaj filozofoj...⁶⁾

La rolon de la centra motivo de filozofiado,⁶⁾ kiu en antikva epoko manifestiĝis per mirego, en mezepoko per humileco kaj en novepoko per dubemo, nuntempe neokulfrape transprenas la senton de respondeco kaj kulpo. La batalo pri la karaktero de la konscio rilate al la ekzisto, kreas la akson de filozofio⁶⁾ – rilate la demandon, ĉu la konscio estas natura agado de la homa organismo, aŭ ĉu oni devas dedukti ĝin el certa supernatura spirita fonto. Tiu ĉi opinio, kiun plejparte akceptis Tomaso la Akvina, suprenigas racion kiel naturan „lumon de ekscio“, tamen submetas ĝin al la kredo je eksterracia aprezita vero.

Laŭ Platono la spirita agado estas kreitaĵo de senmorta animo, kiu estas nur portempe lokita en la homa korpo. Ankaŭ laŭ Aristotelo la pensado (do, ankaŭ la konscio) estas tute sendependa je la korpo, kvankam la korpo partikipas je la perceptado.

Fundamentan influon je la disvolvo de la nocio ‚ekscio‘ havis René Descartes. Li konsideris la animon substanco tute diferenca de la korpo, sendependa je materio. Dum la korpo funkcias kiel meĥanika aparato, ĉiu konscia agado koncentriĝas en la animo. Por Descartes – filozofo⁶⁾ kaj matematikisto – restas la ekzisto de la konscio senduba (cogito, ergo sum = mi pensas, do mi estas) kaj li klopodas trovi neŝanceligitan fundamenton, je kiu povus apogi certa ekscio.

Friedrich Hegel konsideras spiriton kiel la veron de ĉiu reala; la transcendentia konscio de Immanuel Kant estis pure logika konscio, t.e. „pura“ aŭ „origina“ perceptado, premiso de ĉiu ebla perceptado. Franz Brentano (la instruisto de T. G. Masaryk⁹⁾) apologadis racian teismon kaj Jean Paul Sartre, la reprezentanto de ekzistencialismo, ekskludis la objektecon kaj enhavecon de la konscio.

Laŭ la psiĥologia vidpunkto la konscio estas nedivideble kunligita kun la memkonsciado, manifestiĝanta kiel la kapableco diferenci sin el la ĉirkaŭa mondo ekscii la ĉirkaŭan mondon kiel objekton kaj sin mem travivadi kiel subjekton.

Sigmund Freud, la fondinto de psiĥoanalizo, konsideris konscion kiel kvaliton de psiĥo-teritorio kaj ties individuo estas konsiderata kiel portanto de la komplekso - konscia kaj nekonscia. Carl Gustav Jung, la aŭtoro de la nocioj „introverteco“ kaj „ekstroverteco“, parolas pri kolektiva nekonscio. La unueco de konscio kaj psiĥeco el kiuj eliradis la Sankta Aŭgusteno kaj René Descartes, estis rompita per la starigo de konscio kontraŭ nekonscio.

Idealisma filozofio⁶⁾ konsideras konscion kiel manifeston de „supernatura“ spirito, kiel fundamenton de la mondo. La individua konscio estas ofte difinita kiel sumo de opinioj, imagoj, sentoj kaj klopodoj de unuopulo. Aliflanke, la socia konscio en pli larĝa sento signifas la sumon de ĉiuj formoj de la spirita vivo de la socio.

Nia komunikado komprenata kiel la ligo kun la konscio kaj kun Dio estas entute unika kaj ĝi fakte ne bezonas iujn instituciojn, eĉ ankaŭ ili povas esti tre helpemaj...¹⁰⁾

Mi imagas al mi, ke la universaj informoj, tavolitaj unu sur la aliaj per ĉiuj generacioj de mortintaj antaŭuloj, influas nin, parolas kun ni, avertas nin, maltrankviligas nin, vekas en ni la tutan skalon de reagoj, komencante per altruismo kaj per sentoj de bono, tamen aliflanke ili ekflamigas en ni malbonajn pasiojn. Ni spirite komuniku kun ili; ni parolu kun ili kaj ni influu ilin per bonaj pensoj. Ni influu ilin pozitive kaj neŭtraligu tiujn malamecajn...

Ŝajnas, ke tiuj du vojoj povas reciproke proksimiĝi, ĝis ili povas fariĝi vojo unusola, se ni disvastigos nur ĉion pozitivan kaj manifestos, eĉ se

nur per etaj agoj, nian direktiĝon, kaj samtempe ni neglektos ĉiun malbonon kaj ni ne helpos ĝin.

Klopodante pri tio ni ne estos solaj. Ni ne submetu nin al skeptikeco, sed ni levu kapojn kaj estu fieraj ĉeĥoj. Do, ne lasu nin timigi! La socio ne devas akcepti timon kiel normon!

Hodiaŭ kreskas individualismo de unuopuloj. Ne pensi tiom por la prospero sia, sed por la prospero de la tuta socio, estas ŝajne nerealigebla, tamen tio estas la neevitebla celo. Tian individualismon, kiu gvidas al egoismo, oni nepre devas transformi kaj utiligi ĝin por la memedukado kaj pliperfektigado de si mem kaj de sia lando.

Laŭ la vortoj de la „Instruisto de nacioj“, Jan Ámos Komenský¹¹⁾ (KOMENIO), estas bezone, ke estu edukataj ĉiuj homoj sendiference, kaj ke ili partoprenu je la korektado de la mondo. Ke ili estu kapablaj tion fari, ili devas fariĝi kleraj, moralaj kaj piecaj.¹²⁾ Kleraj surbaze de ĉiuflanka edukado, moralaj surbaze de memregado kaj piecaj per la leviĝo super la surterajn aferojn, al Dio.¹²⁾ Ili kapablas tion fari ĉar ili estas ekipitaj por tio de la naturo kaj de Dio.¹²⁾ Komenio preparis unikan sistemon de edukado por plifaciligi tiun procedon.

La aŭtoro de tiuj vortoj estis plenplena de estimo al la homo kaj de kredo je lia/ŝia bona kaj senlime edukebla karaktero, per la kredo je homa racio kaj kredo je Dio kaj danke al tio li konservis al si, malgraŭ gravaj trompoj, neŝanceligitan kredon por serena venonto de sia nacio.

Ne nur ni, individuoj, trapasas diversajn ekzamenojn, kiuj fortigas nin, se ni sukcese pasos ilin, ilin trapasas eĉ tutaj nacioj. Komenio certe konsentus kun la opinio, ke nia nacio sukcesis ĉe tiuj ekzamenoj, per kiuj ĝi maturiĝas al la tasko, kiun ĝi havas antaŭ si – ĝi povus esti bona ekzemplo por la aliaj.

Unu el la plej fatalaj provoj de nia nacio estis katastrofaj postsekvoj de Blanka Monto.¹³⁾ La ekzekutoj faritaj la 1621-06-21 sur Malnovurba Placo¹⁴⁾, konfiskado; la lando ruinigita pro la tridekjara milito, elbruligitaj vilaĝoj, elbruligitaj kaj prirabitaj urboj, elbruligitaj kabanaj, prirabitaj aŭ elbuĉitaj staloj, la tuta triono de nekultivitaj kampoj...

La kontraŭreformacia epoko tamen ne estis plenplena mallumtempo. Baroko portis kun si fortan kulturalan elementon, ekregis arĥitekturon, pentroarton, muzikon kaj popolarion, kapablis mistike ardigi kaj ekflamigi, same kiel la husanismo en sia komenco. Baroko formis la ĉeĥan pejzaĝon, enprintis sin en homajn loĝlokojn, en popolajn kostumojn kaj sonĝojn kaj kreis propran naturan mondon de la kamparo, ion specife ĉeĥan. Eĉ tiutempe ni povas trovi pruvojn de morala klopodo, spurojn de anima ribelo, kiu staras des pli alte, ju pli senĝena estis la premo. La elstaruloj de tiu epoko koncentris sian moralan potencon por savo kaj renovigo de la nacia konscio, por ke ne estu eĉ la ĉeĥa nomo malestimata.

Grandaj meritoj por la konstruo de la nova nacia socio apartenas al la pastra katolika intelektularo, per kio estis mildigitaj religiaj riproĉoj de la pasinteco. Per Balbín¹⁵⁾ kaj pluaj komenciĝas la tricentjara ĉeĥa batalo kontraŭblankmonta, en iliaj manoj ŝanĝiĝas la scienca laboro je la ilo de renovigita agitado.

Tragikaj eventoj de la Blanka Monto¹³⁾ montras al ni, ke eĉ malespera situacio havas elirejon, kiu elgvidas la serĉantojn el la subpremo de perforta silentigado kaj ke ĝi povas finiĝi eĉ neatendite bone, kiel fariĝis per la anonco de la memstara Ĉeĥoslovakio kaj disfaliĝo de Aŭstria-Hungaria monarĥio, tamen sub la dispozicio de certa kunagado de eventoj; nome ke homoj ne nur senage rigardas kaj ke ĝustatempe aperos gvidantaj personoj. Se ni rigardas reen la ĉenojn de eventoj akompanantaj nian historion, ni povas nur miri kaj senfine miregi, kio ĉio formis nian nacian karakteron, nian nacion.

Ni havas inter niaj antaŭuloj kleran Jan Amos Komenský,¹³⁾ kiu donis bonajn ideojn por la pravigo de la mondo, ni havas en nia historio pluajn grandulojn, kiujn la mondo estimis. Senĉese estas por ni granda devoligo kontinui la agadon de niaj antaŭuloj, estimi iliajn grandegajn oferojn, sen kiuj la ĉeĥa nacio apenaŭ defendus sian rajton por simpla ekzisto.

Ni estu modelo por aliaj, ni estu modelo de la nacia toleremo, ni esploru nian historion, veran ĉeĥan historion purigitan de duonveroj, ĉar la kono de nia propra historio ebligas al ni pli bone kompreni la hodiaŭon. Ni havas grandegan devoligon rilate al niaj antaŭuloj, al niaj granduloj. Tamen pli grandan devoligon ni havas rilate al niaj posteuloj kaj al nia belega lando, ilia heredaĵo devoligas nin, ke ni liberiĝu de malgrandanimeco, de kvereloj kaj de ĉio pro kio homoj en nuna tempo tediĝas.

Ni kredu nin, ke ni sukcesos tiun heredaĵon plene utiligi!

Ŝanĝi la socion estas superhoma penado, nome se ni volas la ŝanĝon fari senprokraste, tie ĉi kaj nun, sed tio ne signifas, ke ni rezignu pri provoj tion fari. Grave estas scii, pri la alternativo al la vivo plejparte materialisma, kiu estas ĉirkaŭ ni, nome pri la vivo pli spiritplena sen ne tute fordecidi la mondon materian, ĉar ni estas ankaŭ ties natura parto. Sed la materia kontentigo ne devas esti nia celo, ĝi devas esti nura rimedo por harmonia kaj sencoplana vivo.

Homoj devus mem elekti sian vivovoĵon, mem elekti, por kio ili volas dediĉi sian intereson kaj liberan tempon, ili mem devus ekkoni, kio ilin kontentigos kaj plenigos.

Kompreneble, antaŭ ĉio estas grave, ke ni mem vivu modele, ke ni estu modelo por aliuloj, ke ni mem havu solvitan haoson en nia propra animo, ke ni povu fariĝi veraj lumportantoj.¹⁶⁾ Tiom multaj vortoj estis skribitaj, ke perdiĝas tiuj plej gravaj...

Ni estimu valorajn amikecojn, ni estimu kunvenojn kun grandaj personecoj, ni danku al la sorto, ke ĝi pliriĉigis nin per tiu donaco, kaj transprenu ilian taskon. Ni mem estu subtenantoj kaj konsilantoj por homoj embarasitaj, serĉantaj kaj senkonsilaj. Ni estu por ili modelo, konscio de la nacio.

Ni estimu tiujn, kiuj estas certaj okaze de la sukceso de la homaro klopodanta konservi sin mem kaj la planedon Teron, pli kaj pli elĉerpitan. Estas vane timi anticipan nekonataĵon kaj protekti sin kontraŭ ĉiuj eblaj eventoj, kiuj eble tute ne devas okazi.¹⁷⁾ Kompreneble tio ne signifas, ke ni estu facilanimaj; tute male – tio signifas, ke ni plenkonscie kaj respondece preparu nin por la taskoj, kiujn ni konas aŭ atendas, kaj tio ĝustatempe, ne dum la tempomanko.

Ni devus kredi al ni, ke kiam certa situacio okazos, ni kapablos ĝin solvi, ke ni ankaŭ preferos seriozaĵojn kaj ke ni eklaboros gravajn taskojn sentime kaj plene koncentriĝintaj.

La tuta socio certe ŝanĝiĝos, se ĝi akceptos ŝanĝitajn valorojn, se ĝi estimos homojn ne pro kiu ajn havaĵo, sed pro valoroj spiritaj. Ni mem devus subteni tiun ŝanĝon, ĉar tio ne okazos per si mem.

Tiuj, kies graveco baziĝas sur havaĵo, ofte tiel multvalora ke ne estas atingebla, apenaŭ rezignos sian dominadon kaj senton de sia superregado. Kaj ni povas labori por la momento de la ŝanĝo.

Ni plifortigu tiun ŝanĝon per nia neegoismo, kuraĝo kaj persona sekvinda modelo. Dependas de ni, ĉu ni decidiĝas, kiun ni estimas, kiun ni admiras, al kiu ni volas simili, kiu estas por ni modelo – kaj kompreneble ni montru tion sen grandaj vortoj kaj gestoj kaj laŭ tio ni ankaŭ. Ne ĉio estas havebla helpe de mono, ekz. honoro kaj kredindeco.

Kiujn valorojn ni estimu, kiujn esperojn ni preferu? Ŝajnas, ke altaj moralaj valoroj de niaj granduloj estas iomete forgesitaj, ke multaj el ili estas forgesitaj plene... Ĝis nun ni ne devas suferi mankon de tiaj valoroj, kiel tiam, kiam estis nia nacio sub la ekstera premo devigita protekti sian lingvon kaj eĉ sian propran ekziston – mi emfazas - ĜIS NUN. Hodiaŭ ni atendas valorojn, kiuj respondas al la moderna tempo – per geometria vico akcelanta vivo. Ĝuste iom forgesitaj valoroj – la konscio de nia propra valoro, la belega lingvo, kia la ĉeĥa senriproĉe estas, belega ĉeĥa lando, kiun niaj antaŭuloj venke defendis por ni, kaj ni certe ne volos ĝin forlasi, memrespekto, sprito, la eco kun ĉeĥoj ligita (eĉ kun eta porcio de

ŝvejkado¹⁸⁾, tamen ĉefe la krea forto – tio estos la plej gravaj devizoj en la mondo, kiu tiel rapide tutiĝas. Ni estu atentemaj dum la elekto de tiuj, kiuj ricevas la kompetentecon regi al ni. Gravaj aferoj estus decidataj de la larĝvidaj homoj⁹⁾, homoj edukitaj, moralaj kaj kleraj, ke plu ne estu duboj pri tio, ĉu nia civilizo ne estas direktata al la detruo de si mem, al la memdetruo de la tuta planedo Tero.

Tiuj, al kiuj estis donata la vizio de la estonteco¹⁹⁾, devus havi kuraĝon kaj intelektan povon konvinki aliulojn, ke estas saĝe tiun vizion realigi. Laŭ la opinio de scienculoj ekzistas komuna konscio, kiu devus esti alparolita kaj reformita. Jen hodiaŭ montriĝas kiel tre gravaj tiaj valoroj, kiel estas altruismo. Ni de tempo al tempo ekkonas tion ĉe la homoj, kiuj estas kiel la unuaj, kiel lumportantoj¹⁶⁾ – iomete pli antaŭe sur sia spirita vojo.

Ni havu tian celon, ni laboru je ni mem, ni eduku nin, ke ni povu transdoni niajn spertojn kaj nian ekkonon al aliuloj.

Ni, gvidataj per la sopiro konservi la vivon sur la Tero, luktas kontraŭ la destruktantaj fortoj. Gviditaj per la vizio de bona estonteco kaj certaj de la grandega Dia amo, venke sindefendis okcidentaj kristanoj, niaj delongaj antaŭuloj, kontraŭ arabigado de la eŭropa spaco, ili venke defendis sin eĉ kontraŭ aliaj kaj aliaj insidoj. Ni, gvidataj per la grandega sopiro konservi ĉiukaze nian humanecon kaj plifortigi ĝin ĝis la spirita dimensio, ni devas submetadi nian hodiaŭon al tiuj esperoj kaj lukti pri ili...

Ni estas parto de la sistemo,
kiu emas al la ekvilibro;
ĝi mem resanigas la disŝiritan spacon
kaj kunkudras la nigran truon de la erarigo,
novaj ĝermoj de la kredo trairas ĝin —
kiom da premsignoj de belegaj animoj
la Teron ŝanĝos...

La animo kaptas la lontan
eĥon de la Universo
la memoron de ĉiuj senmortaj animoj.
La Universo pleniĝas per la homo,
tamen nur per tiu, kiu ekkonas,
ke ĝuste li, pli spirita,
estas ĝia senco jak
espero...

Ni estas ĉirkaŭitaj per la ĉieestanta ondado
ni estas enmetitaj en ĝin kaj englutitaj per ĝi
kaj lavataj per ĝi.
Ni estas ĉirkaŭfluataj per konstanta
vibrado de kordoj
per ilia disvibrado kaj sonado,
kiuj transkorpiĝas en la mason,
ŝanĝiĝas je superba polusa brilo,
je neniam finiĝanta murmurado de la maro...

Esperantigis Josef Krob
